FN PER ANC 47

# Normanda Esperanto-Bulteno

BULLETIN TRIMESTRIEL - TRIMONATA BULTENO

Nº 33a (nova serio) - Nº118a - Septembro 1975

**Prizorgas:** Maryse + Pierre Lemarchand 43 rue Desseaux 76100 ROUEN .

**Eldonita de :** la ESPERANTO - Grupoj de la Ruena Regiono .

**Sendu la manuskriptojn antaŭ la :** 10a de februaro - 10a de majo - 10a de aŭgusto - 10a de novembro -

**UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE :** c.c.p. : ROUEN 283 40 H .

**Kotizoj :** Por 1975 : Minimuma kotizo : 5,00 Fr. Subtenkotizo ek de 10,00 Fr.
Nura abono al Normanda Esperanto Bulteno sen membreco : 5,00 Fr.

" La verkantoj respondecas pri la enhavo de la subskribitaj artikoloj "

# Nº 33 a = Nº 118 a

Strange, ĉu ne ? .........

Tamen, jes tiu-ĉi 33a numero ( nova serio ) estas la 118a numero de nia Normanda bulteneto : NORMANDA ESPERANTO BULTENO, oficiala organo de UNUIĜO de la NORMAN--DAJ ESPERANTISTOJ.

Fakte depost la dua mondmilito aperis :

- la unua numero de Normanda Esperanto Bulteno 9 paĝa en oktobro 1947 ĝis la 81a numero : junio 1967, 5 paĝa.
- krome aperis po unu numero de numeroj 6 bis, 10 bis, 14 bis, 74 bis.
- do entute : 85 numeroj ĝis junio 1967.
- ek de kiam Sino VINCENT el Les Andelys transprenis la malfacilan taskon eldoni nian bultenon, ekestiĝis nova serio : de la unua numero, oktobro 1967, ĝis la nuna : 33a septembro 1975a.

Se ni bone kalkulas : nia titolo posedas ĝis nun : 85 + 33 = 118 numerojn.

Tial, ek de la nuna numero aperos apud la titolo, la du diversaj numeroj de nia normanda ligilo, - la malnova kune kun la numero de la nova serio.

De la fondiĝo de U.N.E., en la kongreso de EVREUX, la 11an de majo 1947, ĝis nun, multaj samidean(in)oj baraktis por aperigi nian bulteneton ; ne estis halto.

En la venontaj numeroj de N.E.B. ni klopodos prezenti al vi kelkajn eventojn, faktojn eltiritajn el tiuj diversaj gazetoj. Dank'al ili oni povas bone kompreni kaj sekvi la sanstaton de la Esperanto Movado en Normandio.

Antaŭ la dua mondmilito aperis en nia regiono "Bulteno de la Normanda Esperan--tista Federacio de Internacia Esperanto Ligo" S.F.P.E. de la unua numero : septembro 1933a, ĝis la lasta nº 50a februaro-marto 1940. Bedaŭrinde pro la militaj eventoj, la apero ne povis daŭri.

Dank'al nia amika kasisto Sro JOUIS, ni nun havas kolekton de tiuj malnovaj bultenoj. Tamen mankas al nia kolekto, la tuta serio de la unua esperanto gazeto en Normandio kiu aperis komence de tiu jarcento : Normanda Stelo.

.../...

Polycopié par le Groupe Espérantiste Rouennais . DEPOT LEGAL : 3e Trimestre
.Le gérant : P. LEMARCHAND.

.../... Krome mankas al ni :

- pri la Bulteno de Normanda Esp. Federacio de I.E.L. (1933 - 1940)
  nº 8a . nº 14a .
- pri la Bulteno de la Normanda Esp. Federacio (Post la dua mondmilito)
  bultenoj : nº 1a . nº 2a . nº 3a .
- pri Normanda Esperanto Bulteno (De post 1947)
  bultenoj : nº 3a . nº 13a . nº 34a .

Ni estus tre dankemaj al la samideanoj kiuj povus retrovi en malnovaj arĥivoj tiujn numerojn kaj se ili povus sendi tiujn dokumentojn al ni : ĉe la bultenis--ta adreso.

## Arkivoj

Tutsame, se vi ne scias kion fari pri malnovaj esperantaĵoj : gazetoj, kongresaj fotoj, libroj, arkivoj pri la lokaj grupoj, diversaj asocioj faldfolioj, flagoj, Ktp. ktp....... (Do ĉio pri aŭ per Eº), ni bonvolos konservi ilin en sekura loko, por starigi kvazaŭan "muzeon" aŭ arkiv--ejon pri tiuj tre interesaj dokumentoj. (+)

Oni multe lernas el ili ; plie ni povos facile starigi, per parto de tiuj dokumentoj nian migrantan ekspozicion per paneloj, kiun ni inten--cas prilabori.

Jam dank'al klopodoj de Sino SERY el LE HAVRE, Sro GIBAUX sukcesis savi grandan parton el la arkivoj de la Ruena Grupo, kiuj datiĝas antaŭ 1914. Nun la tuta stoko estas denove en sekura loko.

Eĉ aliaj esperanto-asocioj interesiĝas pri nia modesta bulteno !
Ni antaŭ nelonge ricevis leteron kaj fotojn (pri la muzeo) de Sro LUIS HERNANDEZ YZAL el Sant Paul D'Ordal - HISPANIO -
Li fondis en 1968 kaj prizorgas tre ampleksan "Hispanan Muzeon". Li jam posedas pli ol 2000 librojn kaj pli ol 1900 jarkolektojn de esperantaj gazetoj.
Li havas nur la numerojn 15 - 21 - 24 - 29 - 30 - 31 - 32 - 33 - de nia gazeto.
Ĉu iu bonvolas sendi al li donace la mankantajn numerojn ? Antaŭdankojn !

(+) : Ni bonvolas en Seine Maritime, Eure, Calvados, iri aŭtomobile por serĉi dokumentojn, kondiĉe ke la pezo de la pakaĵoj estu impona, kaj la enhavo interesa.
Kompreneble, se vi sendos ion per la Poŝto, ni estas pretaj repagi al vi la sendkostojn. Do, nepre bonvolu skribi al ni, antaŭ ol sendi ion.
Antaŭdankojn !

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

## INTER NI

### Ni Funebras

Kun doloro ni estis informitaj antaŭnelonge pri la forpaso de nia amika samideano el CAEN : Sro BERNOUIS, Gaston, la 18an de majo. La Eº Movado ŝuldas multon al tiu aktiva simpatia propagandisto. Estas granda perdo, ne nur por la grupo de CAEN, sed ankaŭ por U.N.E. kaj por la tuta esperantistaro. Niajn amikajn pensojn por lia familio.

Plie, ni estis informitaj pri la forpaso de la patro de nia fervora amiko Sro POTTIER. Niajn kondolencojn al la tuta familio POTTIER en FECAMP kaj en YVETOT.

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

## TURISMA KALENDARO

La Esperantistoj de la Centrokcidenta Francio invitas vin al ANGERS okaze de la 26 HOROJ de ESPERANTO !
sabaton 25an de oktobro kaj dimanĉon 26an . Interesaj prelegoj kaj debatoj en amika etoso, ligite kun junulara renkonto. Aliĝprezo : 5 Fr. (unika por la familio) Eblas tranokti en la akcepta centro mem.
Aliĝu rapide, kaj eventuale petu aliajn informojn skribante al :
Sino CHEVERRY, 5 Résidence Dupetit-Thouars, Chemin d'Epluchard, 49000 ANGERS.

# NIA VIVO EN ...

## YVETOT

La grupo ne havis tre viglan vivon dum la pasintaj monatoj La lasta grava kunveno okazis en Januaro. Tiam la Festo de la Reĝoj ricevis sian kutiman sukceson, des pli, ke Patro Kristnasko ĉeestis la kunvenon kaj donacis ludilojn al la infanoj. Bedaŭrinde post tiu festo la grupo iomete dormis, kaj la projektitaj kunve--noj, pro diversaj kialoj, ne povis okazi. Nur la unuagrada kurso daŭris ĝis la fino sed finiĝis nur komence de julio, do tro malfrue por ke la lernantoj povu prezenti sin al la ekzameno. Krom tio, la sola agado de la grupo estis la diskonigo, per cirkulero de la televida elsendo pri Esperanto.
Nun ni preparas la novan lernjaron kaj esperas, ke ĉiuj faros sian eblon por ke la grupo fariĝu denove unu el la plej viglaj el Normandio.
Gesinjoroj WEBER el Middelburg ( Nederlando ) restis 2 tagojn en Yvetot komence de aprilo, kiel gastoj de la tuta familio POTTIER.

## VIRE

De la 17a ĝis la 22a de julio, vizitis Sron LEGRET denove (La trian fojon) Sano MAC LENNAN, delegito de U.E.A. en EXETER, Britujo. (DEVON).
Li estas tre fervora Esperantisto, ankaŭ tre observema, spritplena viro. Niaj du amikoj multe uzis la Internacian Lingvon pri ĉiuspecaj temoj Ili ekskursis tra la urbo kaj la regiono (Boccage), kiu, laŭ la diro de Sano MAC LENNAN similas al la Devon'a kamparo. Li poste ekveturis al Kastelo Grésillon, kie li parto--prenis en la trisemajnaj Internaciaj Ferioj. En tiuj Ferioj, li same partoprenis en la jaroj 1973 kaj 1974.

## LE HAVRE

URBA BIBLIOTEKO :
Sekve de nia alvoko en la Bulteno, pluraj Havraj Samideanoj pruntis kaj ree pruntis librojn el la Esperanto - Fako de la Urba Biblioteko. Rezulte, la Direkcio jam deponis novajn titolojn por cirkulado. Nepre daŭrigu uzi tiun senpagan Servon, kie valoraj libroj estas disponeblaj ! ....
- Dank'al PILO PRESS n° 33/75 -8/9/75- kaj al Sro CHAIM el LE HAVRE, ni scias ke :
" La 4an de oktobro, delegacio de la Havra Esp. Grupo konsistanta el dek-du personoj iros al SOUTHAMPTON Britio por efektivigi la ĝemeliĝon de la du urboj sur la esperantis--ta kampo. La delegacio estos oficiale akceptita de la urbestraro."
Lastminute : Via bultenisto dankas la Havran Delegacion pro la poŝtkarto ricevita !

## GRAND QUEVILLY

Same kiel dum la antaŭaj jaroj Sro QUILLAUD gvidos kurson en la kadro de la Laika Amikaro Bastié Calmette Salengro en GRAND QUEVILLY, ĉiu merkrede ek de la 15a de oktobro de 18h30 ĝis 20h.
La membroj de la loka grupo organizos en la Domo de la Amikaroj publikan ekspozicion ĉefe pri la esperantista literaturo kaj gazetaro, fine de oktobro.
Artikolo pri E° aperis en la loka senpaga informgazeto "Le Signal". Sro QUILLAUD sendis artikolojn pri la leĝopropono al la regiona taĝurnalo "Paris Normandie".

LASTMINUTE / LEĜOPROPONO : Ni komencas ricevi favorajn eĥojn el la diversaj Normandaj deputitoj al kiuj ni sendis leteron kaj broŝurojn. Jam Sro Louis MEXANDEAU deputito el CAEN kiu mem prezentis la leĝoproponon, Sro Tony LARUE el GRAND QUEVILLY kiu ĝin apogas sendis leterojn al nia asocia prezidanto, same kiel Sro Antoine RUFENACHT deputito el LE HAVRE. Plie ni scias dank'al Sro GUILLAUME (Eksprezidanto de U.F.E.), ke Sro LECANUET Justicministro el ROUEN estas favora pri tiu leĝopropono.
... Afero sekvota ....

# ROUEN

+ RUENA REGIONO :

La esperantistoj de la Ruena regiono trovos ĉi kune la tutan proponon pri novaj statutoj de la starigota grupo. Ili bonvolu sendi siajn opiniojn, kritikojn, rimarkojn al Sro Lemarchand.

Ĝenerala voĉdono okazos dum la kunveno de la grupo , kiel kutime en Grand Quevilly VENDREDON 31AN de OKTOBRO je 20h30 en lernejo Salengro, rue Robert Legros. En okazo de neebleco partopreni tiun ĝeneralan kunvenon, vi rajtas voĉdoni perletere.

Dum tiu kunveno ni starigos agadplanon de la nova grupo por la venonta jaro.

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

El la lasta numero de "LE SIGNAL" .

**L'ESPERANTO SERA-T-IL ENSEIGNÉ DANS LES ÉCOLES**

*Après plus de 80 ans de pratique, et d'enrichissement, la langue internationale Espéranto, est-elle sur le point d'être reconnue officiellement par les gouvernements et enseignée dans les écoles ? Les [illegible] qui l'utilisent et qui la propagent le [illegible] puisqu'un projet de loi a été déposé à l'Assemblée nationale par les membres du groupe du parti socialiste et des radicaux de gauche. Cette proposition de loi tend à inclure la langue internationale dans l'enseignement secondaire* [illegible]

# MIGRANTA EKSPOZICIO

30 "Ŝlosilaj Personoj" jam ricevis detalan proponon pri starigo de migranta ekspozicio per paneloj.
Tiuj dokumentoj estas en la franca lingvo sur 15 paĝoj.
Personoj kiuj interesiĝas pri tiu problemo, povas ricevi ilin, skribante al Sro Lemarchand 43 rue Desseaux 76100 Rouen. Samtempe, bonvolu sendi 2,20 Fr. per neuzitaj poŝtmarkoj por la sendkostoj.

Ni bezonas la helpon de ĉiu por efektivigi glate tiun planon de ekspozicio : sendo de trafaj dokumentoj, mona helpo, konsiloj por la prezentado, ktp. ktp....

# ALVOKO !

"KAPABLECO"

Por kompletigi nian sliparon, ni petas precizajn informojn pri la personoj kiuj posedas pedagogiajn diplomojn de FRANCA ESPERANTO INSTITUTO : "Kapableco, Pedagogia Atesto, Diplomo pri Altaj Studoj."
Sendu tiujn informojn al via bultenisto, kaj bonvolu korekti la ĉi-suban liston. Antaŭan dankon !
Laŭ niaj informoj, posedas la diplomon : "Kapableco", la jenaj gesamideanoj :

- ROUEN : Sro BOSC, Sro COSSON, Sro PARRINGTON
- YVETOT : Sro POTTIER, Sro SAUNIER
- LISIEUX: Sino RAULT
- LE HAVRE : Sro GIBAUX, Sino GONTARD, Sino LAVALLEE + Pedagogia Atesto., Sino VINOT
- EVREUX : Fino MONTAGNE
- LES ANDELYS Sino VINCENT + Pedagogia Atesto + Altaj Studoj
- NASSANDRES (27) : Sino LAAGE ?

# KASRAPORTO

Laŭ informoj de nia sindonema kasisto Sro JOUIS el Boisguillaume, estis la 14a de septembro en la kaso : 622,94 Fr.
Dankon pro lia ĉiam akurata laboro !

– Via bultenisto ricevis 100,00 Fr. de anonima persono por la sendkostoj de la "internaj cirkuleroj" senditaj al la Ŝlosilaj personoj + neŝtampitajn poŝtmarkojn de Sroj ROUSSEAU el CAEN kaj LEGRET el VIRE por tiu celo.
Dankon al ĉiuj ! En la venonta numero de N.E.B. ni aperigos novan liston de la novaj aliĝintoj por 1975.


# RAPORTO

## Estrara Kunsido de U.N.E.

La Estraro de U.N.E. kunvenis en YVETOT la 13an de septembro je la 13h30 ĉe Ge-soj POTTIER.Ĉeestis Sroj QUILLAUD, GIBAUX, JOUIS, LEMARCHAND kaj POTTIER. Sroj JOUVIN, DELAUNAY, GUERRE kaj LOISEL petis sen--kulpigon. Du el ili deĵoris en Parizo en Esperanto-ekspozicioj.
Sro QUILLAUD legis leteron ricevi--tan el SAT-Amikaro kaj petantan ĉu iu Normanda urbo bonvolus akcepti ties kongreson en 1976. Li sendos tiun leteron al la grupoj en ROUEN kaj LE HAVRE por ke ili pridiskutu tiun demandon.
Poste oni pridiskutis la ĉefan punkton de la tagordo, kiu estis la leĝpropono pri instru--ado de E° en la lernejojn. Ni decidis danki la deputitojn, kiuj jam subskribis la pro--ponon, kaj sendi al ĉiuj deputitoj el Normanĉio leteron akompanatan de 2 broŝuroj : "Une langue universelle commune à toutes les nations du monde" kaj "L'E° dans l'enseigne--ment".
Post tio oni diskutis pri la pasinta numero de la bulteno, kiu ŝajnas kontentiga, kaj preparis la venontan numeron.
La estraro ankaŭ diskutis pri la loko de la venonta kongreso, kiu povus eble esti en CAEN, se Sro ROUSSEAU bonvolos organizi ĝin. Se ne, ni povos kunveni en FENNEDEPIE. Aliaj renkontiĝoj povus eventuale okazi dum la jaro, ekzemple komuna tagmanĝo okaze de la datreveno de la naskiĝo de Dro Zamenhof, aŭ pikniko dum printempo en FENNEDEPIE, St JOUIN BRUNEVAL aŭ La GRAND' COUR.
Fine oni longe diskutis pri la starigo de migranta ekspozicio, kies organizado postulos multe da tempo kaj dokumentoj.
Antaŭ ol disiĝi, oni fiksis la daton kaj lokon de la venonta kunveno : en LE HAVRE, ĉe Gesoj GIBAUX, la 29an de novembro je la 14a horo.

P.POTTIER.

:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-



«HUIT LANGUES POUR LA POLOGNE»

[illegible]

# LEĜOPROPONO

Kiel ĉiu scias, leĝopropono pri enkonduko de E° en la ler--nejojn de nia lando estis prezentita de 107 deputitoj ĉe la Nacia Asembleo. Dum la lasta estrara kunsido de U.N.E. ni decidis sendi personan leteron al ĉiu el la 27 Normandaj deputitoj kune kun du informaj broŝuroj.
Sekve de tiu decido, Sro QUILLAUD fine de septembro sendis tiujn dokumentojn al niaj deputitoj, petante ke ili apogu tiun leĝoproponon, voĉdononte jese pri ĝi.
Tamen tiu sendado de informiloj estas nesufiĉa. Se eble, bonvolu fari mem,leteron al via propra deputito, kaj/aŭ vizitu lin kun trafaj argumentoj. Niaj klopodoj bezonas la helpon de ĉiu el vi !
Kompreneble ni devas pagi sufiĉe altan monsumon por tiu agado sed ĝi estas nepre necesa. Jam la grupo de YVETOT bonvolis helpi nin per mondonaco al nia kaso por provi muligi la elspezojn de la aĉeto de la broŝroj ka j de la senkostoj.
Tre verŝajne la RUENA kaj HAVRA grupoj faros tutsame.
Nia kasisto Sro JOUIS, tutkompreneble, estas ĉiam preta ricevi ion por nia asocia kaso !

Antaŭdankon pro via komprenemo !



- La partoprenintoj en la Kongreso de Grand-Quevilly, pasintan jaron, certe memoros pri la simpatia Japanino KAZUE SUGAWARA ! Nu ! Ŝi edziniĝis kun Franco, S-ano Michel AUDIBERT el Parizo, kaj la geedziĝa ceremonio okazis en Kristana preĝejo, fare de germana Pastro, dum la Universala Kongreso en Kopenhago. Gratulon kaj bondezirojn !

# INTERVJUO

## de Normanda Esperanto Bulteno (NEB) kun S-ro BOSC



En Val de Saâne , okaze de la Ĝenerala Kunveno de U.N.E. , Ni renkontis S-ron BOSC, nia Honora Prezidanto : ni kaptis la okazon intervjui lin ...

NEB =Kara S-ro Bosc , vi estas konata en la tuta Esperantista Mondo , pro viaj agadoj sur la terenoj de Turismo kaj Komercaj Aferoj ; por ni ,Normandoj, vi krome reprezentas la fondinton de U.N.E.
Ĉu vi povas diri al ni kelkajn vortojn pri la Unuiĝo de Normandaj Esperantistoj ?

S-ro BOSC = Volonte ! . . . Post la milito, la re-interesiĝo por la INternacia Lingvo estis granda , sed la reorganizado malfruis . Plie, multaj personoj nepre deziris resti sendependaj.Oni sentis la bezonon de ligilo inter la Samideanoj ...

NEB = Kaj tiu ligilo estis la Normandâ Bulteno ?

S-ro BOSC = Jes, des pli ke la ekzistantaj Grupoj ne estis sufiĉe potencaj por eldoni propran bultenon : tiam la Normanda Bulteno celis informi ĉiujn Normandojn pri tio, kio okazâs en ilia Provinco, en iliaj urboj , aŭ apudaj lokoj .

NEB = Sed la " Unuiĝo " ne estis nura bulteno ?

S-ro BOSC = Kompreneble ne ! Ĝi celis alporti helpon al izolulo j, krei Grupojn . Jaraj renkontiĝoj estis tre vizitataj ; Kongresoj tre efikis imprese sur la Instancoj aŭ urboj , kie ili okazis ...

NEB = Kelkaj personoj konsideras nian Asocion kiel superflua , ĉar la Esperantistoj estas jam anoj de la Nacia Asocio , aŭ de Internaciaj Organizoj , aŭ nur de Fakaj Asocioj ...

S-ro BOSC = Via demando estas samtempe respondo ! La ekzistado de nia senpretenda Unuiĝo praviĝas pro la fakto ke ekzistas diversaj Asocioj kaj ankaŭ ĉefe , multe da izolulo j .

NEB = Efektive , la " Novaj Samideanoj " , aŭ la " Malnovaj perdiĝintaj" riskas ne trovi sian vojon .

S-ro BOSC = Ja , simpla Asocio kun malalta kotizo povas profiti ne nur al la novaj lernantoj,kiuj per ĝi ekhavas la unuan kontakton kun Esperanto, al la Grupoj,kiuj tiel povas informi siajn membrojn pri la Grupo-aranĝoj sed,ankaŭ, ĝi helpas al ĉiuj aliaj Asocioj,Fakoj, ktp. ,ĉar la Bulteno informas la legantojn pri ĉiuj ekzistantaj Asocioj,kaj tiel vekas la intereson de la Esperântista publiko por tiu aŭ alia Asocio . . .

NEB = Ni ĝojas konstati ke la spirito de la nuntempa " skipo " neniel deflankiĝis de la "denaska ideo" de la Normanda Unuiĝo .....

S-ro BOSC = Ankaŭ mi havas la plezuron rimarki ke junaj kaj dinamikaj homoj reprenis la torĉon ! Se ili povas eviti la rifojn de la "vilaĝaj disputetoj" la estonteco estas promesplena por Esperanto en nia Provinco.

NEB = Kara Prezidanto,ni dankas pro viaj afablaj vortoj ,kaj pro tiu super-rigardo pri la Unuiĝo de la Normandaj Esperantistoj ; ni vetu ke viaj esprimoj alportu kuraĝon al ni por progresigi tiun longspiran Entreprenon : diskonigo de Esperanto !

# LIVRES D'ETUDE ACTUELLEMENT EN VENTE

SUITE n° 4

Les prix ne sont donnés qu'à titre indicatif .

| TITRE / | - 23 - MANUEL de PREPARATION A L'ATESTO PRI KAPABLECO. — | - 24 - PAŜOJ AL PLENA POSEDO — | - 25 - GVIDLIBRO POR SUPERA EKZAMENO : HISTORIO + LITERATURO. 2a VOLUMO. |
|---|---|---|---|
| AUTEUR : | André RIBOT. | William AULD. | Redaktis Alfonso PECHAN. |
| EDITEUR : | Editions Françaises d'E°. | Heroldo de Esperanto . | Hungara Esperanto Asocio. |
| EDITION : | 1965 | 1972 , 2ème Edition. | 1966 |
| FORMAT : | 21 x 27 - Broché . | 12,5 x 19,5 - Broché. | 14 x 19,5 - Broché . |
| PAGES : | 98 pages rénéotypées. | 238 | 192 |
| LECONS : | 24 | 30 | - |
| METHODE : | directe + grammaticale | directe | Tute en esperanto : historio - literaturo. |
| NIVEAU : | cours supérieur | cours supérieur | cours supérieur |
| ELEVES : | adultes | adultes | adultes |
| PRIX : | 8,00 Fr. corrigés : 3,50 Fr. | - | - |
| REMARQUES : | Indispensable pour la préparation au diplôme d'enseignement "Kapableco" | " Se oni studos ĝin atente, oni nepre pose--dos Esperanton plene." | Complément indispensable à tout cours supérieur - |


# DISQUES

| | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| NOS PREMIERS PAS EN ESPERANTO | 1968 | 1 disque souple 1 face . | Editions Fr. d'Esperanto | A. Ribot | 45 T | 17 cm. | 3,00 F +Brochure livrée |
| JUNUIKURSO | 1968 | 5 disques souples 2 faces | SAT Amikaro | - | 33 T. | 17 cm. | 15,00 F. |
| TRA LA MONDO . | 1962 | 6 disques | Editions Fr. d'Esperanto | A. Ribot | 45 T | 17 cm | Livrés avec 7 livrets |
| L' ESPERANTO SANS PEINE ... | 1973 | 16 disques ou 4 bandes ou 4 cassettes | Assimil | Jean Thierry . | 33 T | 17 cm | 248,00 240,00 240,00 |
| Texte d'A. RIBOT | - | 1 disque | Editions Fr. d'esperanto | A. Ribot | 45 T | 17 cm | 4,00 F Texte sur feuillet |
| 6 PREMIERES LECONS du COURS PAR CORRES--PONDANCE de l'UFE. | - | 1 disque | Editions Fr. d'esperanto | - | 45 T | 17 cm | 4,00 F Texte sur feuillet |

Veuillez consulter le numero 29 de N.E.B. qui vous donnera tous les renseignements utiles concernant les services de librairie des différentes associations Espérantistes.

La suite de cette étude ( Dictionnaires et lexiques ) paraitra dans les prochains numéros de N.E.B.

# Ni Rakontas pri ... ... Rothomagus




ROUEN estis, dum la Roma epoko, ĉefurbo de la dua romana administracia en Gaŭle sub la regado de Cezaro. [regiono]

Sankta MELLON estis la unua episkopo en;la jaro 260. CHILPERIC Ia edziĝis kun GALS--WINTHE je la jaro 570, kaj MEROVEE kun BRUNEHAUT en la jaro 576.


Dum la jaro 841, la "VIKINGS" atakis kaj konkeris ROUEN. Ĝis 876, la "Normandoj" faris tiom da domaĝoj, ke finfine CHARLES III devis subskribi, en Saint Clair-sur-Epte, dum la jaro 911, kontrakton kun ROLLON.

Poste, la ĉefo de la piratoj, ROLLON sinkronis kiel " Duko de Normandio" kaj la regiono pace riĉiĝis.

Oni diris tiam ke ROLLON, post tutrabado de la regiono, fariĝis la Filantropo de Normandio.

Post la morto de ROLLON (927) kaj la konkero de Anglujo fare, de GUILLAUME Ia, nomata la Konkerinto, Normandio fariĝis angla feŭdregiono, sekve de la venko de Hastings (1066).

Tamen, en la jaro 1204, la franca reĝo Philippe Auguste rekonkeris kontraŭ la Anglojn la urbon Rouen, kaj zorgis por tuj konstrui kastelon. Sed dum la jaro 1419, la Rouenanoj, forlasitaj de Charles VI, kapitulaciis kaj akceptis denove la regadon de la angla reĝo Henri IVa.



La cathédrale - Portail Central

Post diversaj okazaĵoj, tiam okazis, en 1431, la tragedio de Johanino D'ARC, famkonata heroino kaj sanktulino. Finfine, dum 1449, Charles VIIa forpelis, por ĉiam, la Anglojn el Normandio.

En 1499, Louis XIIa reorganizis la Kortumon, kiun la reĝo François Ia transformis en Parlementon, sen forgesi mem fiksi la regulojn.

Malfrue, en 1562, Kalvinanoj, kies ĉefo estis MONTGOMERY, kaptis la urbon. Sed ses monatoj poste, François de GUISE, tiama estro de la Katolikoj reprenis la urbon.



Le logis St Romain
Maison Canoniale
Rouen

Henri IIIa venis en Rouen por subskribi kontrakton en 1588, kaj la reĝo Henriko IVa triumfe eniris en 1594.

Post la Edikto de Nantes (1598) la komerco prosperis ĝis la nuligo de tiu Edikto, kies rezulto estis la duondormo de la agemeco de la urbo. (1685)

Oni devis atendi la regadon de Napoléon Ia por ke la urbo retrovu sian potencon.

.../... ( Daŭrigota.)

Kompilita de PoGo.

En la venontaj numeroj aperos artikoloj verkitaj de nia amiko GUERRE el Rouen (kiu multobligas tiun ĉi bultenon) pri la konstruado de la pontego de TANCARVILLE.
Faru kiel nia amiko, sendu al ni interesajn artikolojn por aperigi en via bulteno.

# ZAMENHOFA RENKONTIĜO

Ĉiujare, je la 15a de decembro, kiu estas la naskiĝa datreveno de Dro ZAMENHOF, iniciatinto de la Internacia Lingvo, la esperantistoj ĉie en la mondo digne celebras tiun eventon, kune kun la E° libro-Tago.

Ĉijare, ni decidis kunveni en la simpatia urbeto SAINT VALERY EN CAUX, ĉe la mar--bordo, 30 km okcidente de Dieppe, por en amika etoso festi tiun datrevenon.

Tiu finsemajna kunveno okazos en la Junulgastejo (Auberge de Jeunesse) de St Valéry la 13 / 14 an de decembro , laŭ la jena programo :

PROGRAMO

- SABATON la 13an de decembro :
  - ek de la 15 h ; Akcepto de la partoprenantoj
    - Pieda promenado tra la urbo (Se la vetero per--mesas tion)
    - Diskutoj pri la estontaj planoj de U.N.E. : migranta ekspozicio, bulteno, agadplanoj 1976...
    - Ludoj, kantoj...
    - Aŭdado de E°-diskoj.
    - Ekspozicio pri la E°-gazetaro + libroj.
  - vespermanĝo
  - varia vespero : ludoj, kantoj, prelegetoj.... krespa vespero.....
- DIMANĈON la 14an de decembro :
  - ek de la 10 h : Prelegetoj diskutadoj, kantoj ...
  - Komuna tagmanĝo
  - Amuza posttagmanĝo
    - Prezentado de lumbildoj.
    - Sonbendoj, diskoj.
    - Disiĝo fine de la posttagmezo.

- La Junulgastejo estos varmigita.
- Por la vespera manĝo sabate kaj por la dimanĉa matenmanĝo, eblas surloke kuiri manĝaĵojn per gasaparatoj. Oni devos mem prizorgi tion.
- Eblas surloke tranokti (Nur en komunaj dormejoj) 6/8 litoj. Sed bonvolu kunporti littukojn aŭ dormsakon. Estas en la Junulgastejo multaj litkovriloj.
  Vi povos kompreneble elekti, se vi deziras, dormĉambron en unu el la diversaj hoteloj en St Valéry. Sed oni nepre mem prizorgu tion.
- Bonvolu kunporti kantlibrojn, muzikinstrumentojn, kaj bonhumoron......!
- Nepre resendu la ĉi-kunan aliĝilon sufiĉe frue (Antaŭ la 6an de decembro) al Sro JOUIS, kune kun la pago.
- U.N.E. : c.c.p. ROUEN : 283 40 H.
- Sro JOUIS, 621 rue Georges Mugnier, 76230 BOISGUILLAUME.

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

## ALIĜILO

NOMO : ............................ ANTAŬNOMO...............

ADRESO : ..............................................................

☐ Mi venos sola. ☐ Mi venos kun aliaj personoj
Nombro da personoj : ☐

☐ — Mi alvenos sabate posttagmeze aŭ vespere.
  ☐ — Mi tranoktos en la Junulgastejo. Nombro da personoj : ☐
☐ — Mi tranoktos en hotelo kaj mi mem prizorgos mian restadon tie.
  ☐ — Mi ĉeestos la kunvenon, sed revenos hejmen por dormi.

☐ — Mi alvenos nur dimanĉe.
  ☐ — Mi deziras partopreni simplan tagmanĝon dimanĉe por ☐ personoj.

☐ — Mi intencas kanti, diri poemojn, aŭ rakontojn.
  ☐ — d° organizi ludojn aŭ skeĉon
☐ — d° prezenti lumbildojn, aŭ filmojn.
  ☐ — Aliaj sugestoj :

Bonvolu plenigi kaj turni....

# STATUTOJ — INTERNA REGULARO

La Ĝenerala Kunveno de U.N.E. unuanime akceptis en VAL de SAÂNE la jenajn internajn regulojn

STATUTS – REGLEMENT INTERIEUR :

1) – Attribution des pouvoirs :
Les membres ne pouvant assister aux débats de l'Assemblée Générale Ordinaire ou extraordinaire, peuvent transmettre leur pouvoir à un autre membre de l'Assemblée Générale.

2) – Nombre de pouvoirs détenus :
Chaque membre de l'Assemblée Générale ne pourra détenir plus de 5 pouvoirs. S'il y a un surplus de pouvoirs, il pourra être redistribué à d'autres membres ne détenant pas ce maximum.


3) – Cotisation couple de membres titulaires :
La cotisation minimum d'un couple de membres titulaires est fixée à une fois et demi la cotisation minimum de cette catégorie.

4) – Abonnement seul à Normanda Esperanto Bulteno :
L'abonnement seul à la revue de l'association aura un montant égal à la cotisation minimum de membre titulaire.

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

# DISTRA ANGULO

Ĉe la nudista kampadejo :
– Bonan tagon, Sinjoro, estas agrable vin renkonti ĉe nia tendejo. Sed, kial vi surhavas kalsoneton ?
– Ŝut ! Ne parolu tiel laŭte ! Mi estas tie inkognite ! ......



La solvo de tiu rebuso estas fama elsendo de televido ?

Kio estas tio ?

Solvo : Dosieroj de l'ekrano

ACIDAN
CIDRON
FORJETU

Perleteraj Operacioj !

Anstataŭigi ĉiun literon per cifero (La sama cifero por la sama litero), utiligante ĉiujn ciferojn de 0 ĝis 9, tiel ke la adicio estu vera. Ĉar estas 12 malsamaj literoj por nur 10 ciferoj, notu ke F = I kaj ke C = Ĵ.

Solvo en la venonta numero.

JARA KOTIZO AL U.N.E. : 5 Fr

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

– ZAMENHOFA RENKONTIĜO : 13 :14an de decembro 1975. St VALERY EN CAUX.

ANTAŬPAGO : Kiu aliĝas, tiu antaŭpagu la tuton. En okazo de lastminuta nepartopreno, la Kasisto repagos al vi la antaŭpagon.

| | NOMBRO | PREZO | SUMO |
|---|---|---|---|
| – Tranoktado en la Junulgastejo + komuna tagmanĝo dimanĉe. : | | x 20,00 Fr | |
| – Nura tagmanĝo dimanĉe + uzo de la ekipaĵoj de la Junulgastejo : | | x 15,00 Fr | |
| – Libervola subtenkotizo : | | x | |

DATO :

SUMO : ......

SUBSKRIBO :